

*Literatura Mondo*, 3-a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 462, 1972.08.16 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj someraj elsendoj ni rigardas al la revuo *Literatura Mondo*, kiu naskiĝis antaŭ kvindek jaroj kaj tiom influis la esperantan kulturon.

A.- Ekde la unua numero *Literatura Mondo* havis decidigan influon sur la versfaradon, tio tre verŝajne dank'al la pedagogia talento de Kolomano Kalocsay.

Cl.- En la unua numero de *Literatura Mondo*, oktobro 1922, aperis sub la titolo *Disputo* artikolo, kiu estas epokfara. Post ĝia apero la poetoj ne plu same rimos, kiel antaŭ ĝia publikigo. Povas esti, ke tiu artikolo multon faris por grandigi la influon de Kalocsay en la esperanta poezio.

A.- Jen ni legas al vi erojn el tiu gravega kaj historia artikolo :

Cl.- « *Rimi en Esperanto ne estas malfacile.*

A.- *La radikfinaĵoj, plensonoraj per la forta akcento kvazaŭ tentas, elvokas « kunrimigu nin ».*

Cl.- *Kaj jen, homoj kiuj neniam provis ĉarpenti eĉ unu strofon en sia gepatra lingvo, lerninte Esperanton subite trovas en si kapablon poezian kaj provas per kuraĝa salto eksidi sur la dorso de Pegazo.*

A.- *La hazardo, ke **doloro-koro-floro-ploro-memoro, amo-flamo, morto-sorto** kaj tiel plu interrimas, la ebleco de rimoj, kiel **koreto-maneto, amego-dolorego**, eĉ **vidadas-voladas** estas kulpaj pri multaj kaj neatenditaj « poetiĝoj ».*

Cl.- *Sed konkludi el ĉi tio, ke Esperanto estas riĉa je rimoj, estus tute erare. Ĉar la **adas-ismoj** ne estas rimoj. Per Dio kaj diablo ! Ili ne estas rimoj ! Krimoj ili estas ! Blasfemoj kontraŭ dio Apollo ! Kaj la ceteraj rimoj ĉiuj estas radik-rimoj, do ilia nombro estas limigita, kvazaŭ elkalkulebla. » (Fino de la citaĵo).*

A.- Tie ĉi ni devas alporti klarigon. Kiam Kalocsay uzas la vorton **adas-ismoj**, dirante *adas-ismoj ne estas rimoj*, li aludas al fama poemo de Antoni Grabowski, kies titolo estas : *Sur unu kordo* kaj subtitolo : *defendo de l' rimo*.

Cl.- En tiu poemo Grabowski kritikas la poetojn, kiuj kunrimigas, kiel Ludoviko Zamenhof, vortojn finantajn per sama sufikso : jen ekzemple tiaj rimoj en la fama poemo *Mia penso* : *detruita-refrapita, kompatante-resangante, senmoveco-infaneco, ploranta-ripozanta, parolado-promenado, ploranta-ordonanta, deziras-iras.*

A.- Por Grabowski, kaj nun por Kalocsay, similaj rimoj estas krimoj, blasfemoj kontraŭ dio Apollo, eĉ se ilin forĝis la Majstro. Ni redonu la parolon al Kalocsay.

Cl.- « *Ni povas diri, ke la unuavida rimriĉeco [de Esperanto] estas nura ŝajno. Vere la tradukanto uzanta nur purajn kaj verajn [ne adasismajn] rimojn, staras multfoje antaŭ*

*apenaŭ plenumebla tasko, kaj eĉ se sukcesas al li tiel ĵongli la vortojn ke la finaĵoj de la verslinioj kunrimu, la ĉiam ripetiĝantaj eluzitaj rimvortoj efikas monotone kaj enuige.*

A.- *La poeto nur kvazaŭ honte aplikas tiajn ŝimajn prarimojn, kiel vento-sento, aŭ fino-knabino.*

Cl.- *Prezantas sin do la demando, kiel pliampleksigi la Esperantan rimvortaron. Kaj tie, same kiel en la ritmo... oni devas konsideri la naturon de nia lingvo.*

A.- *La vokaloj estas en nia lingvo akre diferencitaj, klare elparolataj, en la antaŭlasta silabo ankaŭ akcentitaj, en la lasta silabo ili portas la gramatikan karakteron de la vorto, ilia malsameco forte evidentiĝas.*

Cl.- *Do rimoj kun vokal-malsameco (precipe uzataj de rusaj samideanoj) - homo-doma, belapeli, eĉ batali-ĉevalo – tute ne sentiĝas rimoj. » (Fino de la citaĵo).*

A.- Ni rimarku, ke en la zamenhofa poemo *Mia penso* troviĝas unu el tiuj de Kalocsay kritikataj rusaj rimoj : *karan-altaron*.

Cl.- Kalocsay daŭrigas : « *Restas la konsonantoj. Ili kaŝas sin en la ombro de la forte akcentitaj vokaloj, kaj oni tute ne rimarkas, se ili ne estas la samaj, nur parencoj proksimaj.*

A.- *Kompreneble oni devas aŭdi ilin kaj ne vidi, precipe ne serĉi ilin persekutante, kun la ruĝa kraĵono en la mano. » (Fino de la citaĵo).*

Cl.- Kalocsay listigas tiujn parencajn konsonantojn : b-p, d-t, f-v, g-k, h-ĥ, l-r, m-n, s-z kaj ŝ-ĵ.

A.- Kaj li donas ekzemplojn kun asonancaj rimoj : *sorĉa-dolĉa, pinta-inda, montri-tondri, kaŝo-balaaĵo, soifa-naiva, ardu nur-maljunul'.* »

Cl.- Kaj li konkludas : « *Ĉu ili ne bone sonas kune ? Kaj pripensu, ke en versoj ili ne staras unu apud la alia, sed en distanco de pli aŭ malpli longa verslinio. La asonancoj estas plifortigeblaj per la kunsonoro de la antaŭaj silaboj. [...]*

A.- *Jen do, en la asonancoj nova afero por montri la lertecon de la poeto. Okazo por montri lian artkapablon, guston, ĝustan juĝon. Armilo kontraŭa mucidaj adas-ismoj. »*

Cl.- Sian artikolon Kalocsay konkludas per poemo, en kiu abundas la asonancaj rimoj.

A.- En ĝi li tamen avertas la disĉiplojn ne trouzi tiun novan rimedon. Aŭdu la konsilon :

Cl.- « *Sed jen tezo  
Por sukceso :  
Ne trouzu la 'fuŝaĵon' !  
La piedo  
Post ireto  
Falsa, ĝustan iru paŝon ! »*

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!